

Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

OCTUBRE
NOVIEMBRE
DICIEMBRE
1 9 5 7
PELAYO. 7
VALENCIA

FRUCTÍFERO DECENIO

Diez años; diez fructíferos años lleva sembrando actividad prometedora nuestra Federación. Los que vivieron los ázarosos tiempos de sufundación recordarán siempre aquella noche del 15 de Diciembre de 1947 en que, reunidos en fraternal ágape, celebraban el aniversario del nacimiento del Dr. Zamenhof. La alegría de aquella primera reunión, con tal motivo, era presagio de jubilosos acontecimientos. Y, efectivamente, a punto de comenzar el acto, nuestro Secretario entró emocionado blandiendo la comunicación en que se nos participaba la autorización oficial para nuestra vida legal. La indescriptible alegría por la tan deseada autorización solo podría ser superada, en un futuro jubiloso, por la total y definitiva victoria del Esperanto en todo el mundo.

Desde aquella venturosa fecha, la Federación no ha cesado de bogar —no siempre por tranquilos mares— pero siguiendo invariablemente su marcado derrotero. Afortunadamente, las tormentas y los golpes de mar no han alterado su curso; nuestra nave ha sido, para todos los esperantistas, emblema, ejemplo y escudo. Y su labor, ora pública, ora incógnita, ha sido eficaz. La incesante semilla esparcida por su Boletín, la organización y creciente éxito de siete congresos nacionales, la formación de varios grupos locales, el establecimiento de relaciones constructivas con U. E. A. y el decidido apoyo de todos los miembros de la Federación a los esperantistas extranjeros, en visita por España, son exponentes de la actividad de un sentimiento de solidaridad espiritual cuya base de sustentación es la Federación misma.


Pero, la mayor y más laudable realización federativa ha sido la creación de ese sentimiento afectivo y familiar, entre todos los esperantistas españoles, logrado por la comunidad de anhelo idiomático, de moralidad y de consideración fraternal, y no en pequeña escala por la reiterada asistencia a los congresos, que, además de su cometido oficial, vienen a ser como el laboratorio en que se originan multitud de amistades, cimentadas al calor de una idea generosa y humanitaria. Y, como prueba palpable de ese magnífico sentimiento de solidaridad, ahí está el unánime clamor de pesadumbre y la enternecedora promesa de apoyo material de todos los esperantistas españoles hacia las víctimas de la terrible inundación recientemente sufrida por los valencianos, entre los que se cuentan unos cuantos samideanos, cuyos modestos ajuares e instrumentos de trabajo desaparecieron entre las turbulentas aguas, o se desintegraron bajo espesa capa de lodo... La Federación ha proporcionado ya diez años de existencia oficial, de tranquila labor, de eficaz propaganda, de vital instrucción y de satisfactoria organización a todos los esperantistas españoles.

Sigamos, pues, apoyándola con todas nuestras fuerzas. Solo ella puede asegurarnos la consideración, la seriedad, la garantía y la protección que el Esperanto necesita para desarrollarse decorosamente en España. No le regateemos nuestros esfuerzos y nuestra ayuda. Que en toda España se difunda y fortalezca. Y cuando, al final de otro decenio, se haga el recuento de su ejecutoria, se encuentre un balance aún mejor que el actual. Y si nosotros tuvimos el jubiloso placer de crearla, que nuestros sucesores puedan contemplar alborozados la resplandeciente aurora de su triunfo, para satisfacción propia y para el bien de todo el mundo.

Nun, fronte al dua pli matura jardeko, la tula membraro, en firma kohera laborado, kun optimismo kaj espero, povas jam rigardi malproksimen...

EL LA LETEROJ DE NIAJ KORESPONDANTOJ

IOM PRI NACIAJ LINGVOJ



«En norda Anglujo kaj — eĉ pli notinde — en Skotlando, oni multe pli klare reliefigas la literon r. En kelkaj regionoj de Anglujo, oni ŝajne ignoras, ke tiu litero ekzistas en la alfabeto. Fcĵe mi diskutis kun angloj pri tio, sed oni devas esti singarda, ĉar ili ofte indigniĝas por tia kritikado kaj rifuzas kredi aŭ konsenti, ke ilia prononcmankiero ne estas ĉiel korekta kaj ĝusta. En suda Anglujo, la vokaloj emas aliĝi en diftongojn; ekzemple (*No: naŭ*, k. s.). Sed, la angloj mem ne konscias pri tio; tial ili tre surpriziĝas, se oni ilin atentigas. Estante skoto, mi devas, kompreneble, singarde skribi, por ke vi ne taksu min fanfaronulo, sed honeste mi opinias, ke, se vi venus Britujon, vi pli facile komprenus la elparolon de edukita skoto ol tiun de samgrada anglo.

Ne necesas diri, ke ankaŭ troviĝas ĉe ni rondoĵi, kie la parolmaniero estas fva. La prononco de la glasgova laborista klaso, ekzemple, estas vere neklara kaj, por alilingvulo, sendube preskaŭ tute nekomprenebla. Interese ankaŭ estas aŭskulti la prononcon de la skotoj en la nord-okcidentaj regionoj, kiuj denaske pli kutimas uzi la praan gaelan lingvon. Kiam tie oni parolas angle, oni tre klare prononcas ĉiun silabon. Plej notinda trajto estas la forta siblado de la litero s. Ankaŭ tie, kie s laŭsone egalas z, oni same ĝin siblas (*it is - z : it iss*). Aldone, ili renversas la ĝemelajn sonojn f kaj v; tial, anstataŭ *very*, ili diras *ferry*. Ĉe ili, ofte ĝ akiras la malmolan sonon de k :

It iss ferry koot of you.

Jen denove pri la angla prononco; tie

ĉi, ni ĉiam pli forte notas la oftan ellason de n. Anglo el la Sudo prononcas *whale* precize same kiel *wail* aŭ *wales*; *wheat* fariĝas *weet*, k. t. p. En Skotlando, la gorĝsonoĵoj same aŭdiĝas, kiel en Germanujo. Anglo, same kiel franco, spertas multe pli da malfacilo pri tio, kiam li uzas la germanan. Oni komprenu, tamen, ke mi skribis esence nur pri normoj. En la plej bone instruitaj klasoj, la prononco estas senmakula, kaj en Anglujo kaj en Skotlando, kio cetera same validas por ĉiuj landoj».

N. H. C. MACPHERSON

163 St. Vincent Street
GLASGOW - C. 2 (Skotlando)

«La artikoleto pri la baska lingvo (1) multe interesis min. Eble, lingva babildeto pri mia lando ankaŭ interesos la legantojn de nia bulteno. Svisujo havas oficiale 4 naciajn lingvojn, ĉiuj *egale samrajtaj*. La romanĉa apartenas al la plej malgranda grupo. Tiu lingvo estas parolata de nur 1 % de la svisa loĝantaro. Sed, malgraŭ tio, ĝi estas oficiala nacia lingvo. 72.6 % el la svisoj parolas la germanan lingvon (ĝi estas mia gepatra lingvo), 20.5 % parolas la francan, 5.9 % la italan kaj, kiel jam dirite, 1 % la romanĉan.

En Svisujo, precipe en la germane parolantaj provincoj, oni multe studas fremdajn lingvojn. Plej multe la anglan, sed de post kelkaj jaroj ankaŭ la hispanan. Mi mem partoprenis du kursojn, sed mi devas konfesi, ke via lingvo kvankam bela estas ege malfacila por lerni».

JOSEF KOCH

im Feld FISLISBACH - A G (Svisujo)

(1) BOLETIN (n.º 101) Majo 1957. paĝo 47.

ZAMENHOF - STRATO EN MANRESA.—La urbestro de ĉi tiu bela kataluna urbo, akceptante ideon de la Esperanto-Fako de societo «Lingua Club», decidis doni la nomon de D-ro Zamenhof al nova strato, kiel publika omaĝo por la genia aŭtoro de la Lingvo Internacia; kaj honorinte lin, la dignaj aŭtoritatoj de Manresa ne nur kontentigis ĝeneralan deziron de klera urbo, sed ankaŭ honoris sin antaŭ la hispana kaj tutmonda esperantistaro. La Federacia Estraro salutas kaj gratulas niajn amikojn en Manresa, kies sukcesa demarŝo certe instigos la samideanojn en aliaj urboj agi laŭ sama direkto, por ke en la centjara jubileo de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, nepre estu strato kun lia nomo, en ĉiu hispana urbo, kie loĝas esperantistoj. Jen do plano, kiun ni submetas al ĉies konsidero!

POEZIO NE TOLERAS DIFINON...

Resumo de la prelego de D-ro Mariano Solá en salono de «Centro Asturiano» dum la Literatura Festo, en Madrido (28. Julio) okaze de la 18^a Hispana Kongreso de Esperanto

En la Festo de la Printempo, kie diversaj poetoj legas siajn verkojn, oni pretendis difini la koncepton pri poezio. Estis multaj kaj diversaj respondoj, ne ekzistis kontentiga por ĉiuj. Poezio estas mistero, ĝi estas enigmo kaj ne toleras difinon; ĝi apartenas al regno de la sentoj, multe pli ol al tiu de la intelekto.

Kio povas esti temo de poezio? Kio ajn; la lando de la poezio estas senlima, kaj ĝuste oni povas taksu la majstrecon de aŭtoro, kiam el malgrava temo li sukcesas eltiri allogan kaj kortuŝan verkon; ekzemplojn ni povas vidi en Heine kaj en la verko «Platero» de Juan Ramón Jiménez, kie la ĉefa persono de la poemo estas malgranda azeno --por la homoj simbolo de stulteco-- sed kiun la aŭtoro sukcesas tiel ĉarme prezenti al ni, ke larvoj venas al niaj okuloj, kiam ĝia vivo ĉesas.

La plej taŭga kaj valora tasko de la poetoj konsistas en tio, ke ili instruas al ni vidi la mondon, kia ĝi efektive estas kaj ami la naturon. Nia situacio en la mondo estas tute speciala: inter ĉiuj aliaj estaĵoj, la homoj estas la solaj, kiuj hezitas en sia agado kaj timas malsukceson, la ceteraj estaĵoj agas preskaŭ aŭtomate. Ni estas la solaj, kiuj scias, ke ni povas malsaniĝi kaj resti neutilaj por laboro; la solaj, kiuj scias tute certe ke, ni devas morti!

Kiel trafte tion esprimas Rubén Darío en sia poemo «La Fatalo»:

*Feliĉa la arbo, kiu estas apenaŭ sentema,
Kaj pli la ŝtono, ĉar tiu jam ne sentas,
Ĉar ne estas doloro pli granda kaj pli
Ol la konscia vivado. [premanta,*

Sed ke malgraŭ tiu konscio, la homoj ne lasas sin venki de la pesimismo, sed ke ili laboras kaj strebas, estas la gloro kaj la herocco de la homa vivo.

Trafte tion esprimis la hungara poeto Madach, en sia verko «La Tragedio de l' Homo»; ĉe la fino de la poemo, kiam la homo sin turnas al Dio, por klarigo de sia destino, Dio respondas al li per nova enigmo:

Penu hom' kaj firme kredu!

La eminenta filozofo Santayana, naskiĝinta en nia lando, en sia verko «Tri poetoj -filozofoj»: Lukrecio, Dante kaj Goethe, rimarkigas, ke la granda itala poeto, aŭtoro de la «Dia Komedio», kvankam li havas tre grandan imagon kaj bildokapablon, li ne tiel bone sukcesas doni tiel impresan bildon de la Paradizo, kiel li tion faras de la Infero. Ŝajnas kvazaŭ al ĉiuj poetoj estus malfacile pentri en konkreta formo la staton de feliĉeco. Tion ni povas rimarki ankoraŭ en la bela kaj pensiga poemo de Johano Maragall «Kanto Spirita» kiun al Esperanto tradukis unu el miaj amikoj; jam forpasinta Jozefo Grau Casas; Maragall kiel Dante ne sukcesas kompreni alian mondon ol tiun en kiu li vivas:

*Tute same! Ĉi tiu mondo, kia
estas, laŭ temp' kaj diversec' tiela
ĉi tiu tero kun kreaĵo ĉia,
tamen estas, Sinjor', patrujo mia;
kaj ĉu ne povus esti' ĝi ĉiela
ankaŭ por mi patruj'? Mi homo estas
kaj homa estas mia la mezuro
por ĉio, kion povas sub lazuro
esperu mi: ĉu Vi, se la espero
kaj fido miaj tie halte restas,
pro tio min kulpigos en pretero?
En pretero la stelojn kaj ĉielon
mi vidas, kaj dezirus el homgento
eĉ tie esti; se Vi tian belon
al ĉio donis por okuloj miaj,
se tiajn kreis Vi por admirisento,
kial sen ili serĉi kroman celon?
Se tia montros sin al mi, nenia!
Vi estas, ja; sed kie?... Kiu scias?
Ĉio laŭ vid' similas Vin en mi...
Mi kredu do... Vi estas tie ĉi!
Kaj kiam venos la timinda horo,
kiam blindiĝos mia homa vido,
al mi novan malfermu via fido
por senfinan rigardi Vin, Sinjoro!
Estu por mi la mort', naskiĝ' al gloro!*

Kaj kiam alta poeto parolis, aldoni pluajn vortojn, tio estus fuŝi la belan, valoran kaj profundan impreson!

La supera kvalito de nia poezio pravas la kvaliton de nia lingvo!

LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

AL ĈIU BESTO PLAĈAS ĜIA NESTO

..... Nefermita letero al S-ro Luis Hernandez, redaktisto de BOLETIN

Kara amiko! Kun iom da surprizo mi legis la atentigokapon, kiun vi stampis al mia kontribuajo por la 100-kajera jubileo de nia BOLETIN. Antaŭprepari legonton, ekkarikaturante stilon, minimume povas aperi kiel neĝentilaĵo, des pli se la aŭtoro verkis laŭ invito. Sed ja ne pri redaktogavoto temas mia letero!

Vin mi ĉiam legas kun atento, kun ŝato kaj ĝuo. Mi konstatis, ke por vi --eble sub influo de via oratora artsento-- pli gravas sonfluo, sugestia esprimo, orelo kaj koro, ol logiko, dirotajo, okulo aŭ simple blanka normalo. Verŝajne iel simile al la konstato, kiun Szilágyi faris en «Norda Prismo» pri la kunrilato inter la pentrista metio de Rossetti kaj ĉi ties verkado, kiam li recenzis «El la maniko», kio cetera estas pli klare konstatebla en la bildosvarmado de la rossettiaj poemoj. Laŭ alia direkto, la suverena bildometaforado de Kóković min ravas, kaj por mi ekzemple estis ebriga plezuro legiliani lastan intervjuon en «Esperanto» de UEA.

Malpli dotita, mi celas konformigi mian stilon al la reliefigo de la sencoenhavo, al la eluzo de la logikaj sencorimedoj de la lingvoelementoj, al la elradika ekspluato de la povebloj de Esperanto, probable zorgante pli analizan komprenemon ol la voĉtaŭgecon de la rezultajo. Sed, laŭ mia kompreno, kernorolon de lingvo konsistigas unue ne belsonoco, sed ĉefe sencocomtro, kaj pli nepre, kiam temas pri Esperanto, kiu kunligas ĉiakulturajn homojn el tre malsamaj lingvokutimoj. Tio ne signifas, ke mi malŝatas bildon, koloron, sonflumon ktp; ĝi signifas vidpunkton, laŭ kiu ĉi tiuj elementoj, eĉ se ĉiel atentindaj kaj nepre studendaj, rangas, ĝenerale, vicloke. Tre certe, mia pozicio dokumentas nur mian malkapablon manipuli aliajn gamojn; kaj mian admiron al via kreotalento, kaj al tiu de aliaj lingvoartistoj, naskas neeblo tiel alten flugi. Tamen, kiam mi legas la prozon de Waringhien,

mi ŝatus disĉiple kunflui tiun klaran fontanon de idioma logiko, de harmonia precizo, de universala kompreneblo, de saĝula ekvilibro...

Dum sia evoluo, la hispana lingvo forĝis al si vortojn, kiaj: *ubicuidad* (el la latina adverbo *ubique*), *arredrar* (el la lat. adv. *retro*) kaj sekve postkonstrue *redropelo* k. s. *espicilegio* (anstataŭajo de la vulgara *antologia*, el la lat. *spicum* plus *lego*: *spikokolektaĵo*) ktp. --mi povus multenombri ekzemplojn-- temas ja nur pri admirinda ekspluato de primitivaj esprimrimedoj, kun sukcesa streĉo al vivantigo de idiomaj virtualaĵoj. Per TREA PRAO, kiu vin ŝokis, mi celis ion similan. Ĉar, kiel diris Don Kihoto: (*) «...y cuando algunos no entiendan estos términos, importa poco, que el uso los irá introduciendo con el tiempo, que con facilidad se entiendan; y esto es enriquecer la lengua, sobre quien tiene poder el vulgo y el uso». (II - 43).

Pravas Dalmau --ĉiam laŭ mia kriterio, kompreneble!-- en sia ŝatinda libro «Dialekto, dialektiko»: «Ni klopodu progresi kaj interkompreniĝi laŭ naturaj kondiĉoj, cirkonstancoj, diferencoj, laŭ senfinaj personaj dialektoj kaj dialektikoj, cele al ideale komuna Esperanto, milda kiel tiu de Privat, firma kiel tiu de Lapenna, ekvilibra, saĝa, kiel tiu de Zamenhof» (p. 7) Eĉ se mia stilo estas al vi malsimpatia, ĉar ja malsamtipa, mi volas fini per saĝajo, kiun mi lernis en nia *Proverbaro*: «Maro ĉiujn riverojn ricevas kaj tamen ne krevas»...

Kun sinceraj samideanaj salutoj,
amike via

J. RÉGULO PÉREZ

La Laguna, Junio 1957.

(*) «...kaj kvankam kelkaj ne komprenos ĉi tiujn terminojn, tio malmulte gravas, ĉar pere de tempo, la uzo ade enkondukos ilin, ĝis oni facile ilin komprenos; tiel riĉigas la lingvo, sur kiun havas povon la popolamaso kaj la uzo». (Dua parto. Ĉap. 43).

Konciza respondo de la Redaktoro.—Se oni relegas la aluditajn ATENTIGOKAPON, oni konstato, ke neniel mi intencis karikaturi aŭ primoki la stilon de tiel bona amiko, kiel vere estas S-ro Régulo Pérez, Mi nur reliefigis lian emon provi formojn, kiuj miaopinie ankoraŭ ne estas en natura evoluo kaj, sekve, ne estas oportune konvenaj por ordinara leganto.—L. H.

Jes, ankoraŭ, de tempo al tempo, ĝenas nian atenton la manio de la sensuper-signado. Ĝia plej lasta furunko ĵus erupciis, en formo de pedanta folieto kun tediaj ŝablonoj kaj torditaj *pliboniĝoj*, kelkaj el ili tiel ekstravagancaj kaj absurdaj, kiel tiuj anstataŭigi supersignon per subsigno (ç) aŭ per groteska transkapigo de literoj kaj ciferoj, ŝajne nur por monstre malbeligi la aspekton de nia skribo, servute submetante ĝin samtempe al la naciaj alfabetoj.

Tiu stranga salato trovis tamen --jen do sola kaŭzo por mia interveno!-- tablon kaj pladon, inter la veteranaĵoj de «Heroldo de Esperanto», kie, en tre detala kaj sufiĉe ampleksa recenzo, kun pli da spaco ol kutime oni uzas, por gravaj kaj valoraj libroj, en la koncerna rubriko, anonima recenzisto, *kvazaŭ objektivite informante*, stimulas la entreprenon per indiko pri la adreso de la aŭtoro, ekspono de la proponataj reformoj kaj bedaŭro pro rifuzoj aŭ protestoj, fare de *konservativuloj*, antaŭ ĉiaspeca ŝanĝo. Krom tio, flanke de cikanoj kontraŭ nia jam klasika ortografio, li iras eĉ pli malproksimen, *plibonigante* la *pliboniĝojn* per vualita atako al la propra fundamenta strukturo de nia lingvo; ĉar, laŭ lia opinio, se la freŝbakita projekto forigas la supersignojn, «restas ankoraŭ la neplaĉaj multaj j-finaĵoj»...

Kvankam, kiel dirite, la recenzo ne havas konatan patron, la trajtoj de ĝia stilo iel forblovas la anonimecon, kio, cetere, des pli funde ĉagrenas pro la alta prestiĝo de «Heroldo de Esperanto», nia sola duonmonata gazeto, kies sendependeco --mi opinias-- neniel pravigas akcepti tiel *facilanime* --mi volas tion kredi-- jonglaĵojn kaj diletantismojn, kiuj --kiel tie oni mem konfesas-- ŝokas la sentojn de ega plimulto el la matura samideanaro kaj, aldone, semas konfuzojn kaj eventualajn disreviĝojn inter la novaj elementoj, venantaj en niajn vicojn.

Estimata S-ro Teo Jung! Povas esti, ke tro subtilaj skrupuloj diktis la antaŭajn vortojn, sed ilin mi ne povis ne diri; tial, por tute konsekvence fermi la babilon, estu al mi permesate uzi la formon, kiun foje vi aplikis ĉe la fino de unu el la viaj ĉiam oportunaj admonoĵoj: Tia ne estas la maniero, ne estas la maniero... **LUIS HERNANDEZ**

Kiel anonco de Kristnasko, **LA ZAMENHOF-TAGO** jam estas denove proksima. Ni esperas, ke en ĉiuj hispanaj rondoj oni festos kaj celebros ĝin, laŭ maniero plej adekvata, por samideane plifortigi la internajn rilatojn kaj efike diskonigi niajn klopodojn al la ekstera publiko. Krome, ĉar ankaŭ tago de la Esperanto-libro, oni ne forgesu aĉeti eĉ modestan kajeron, por konscie atesti, ke en tiu dato --pli ol en iu alia-- spirite ni nin sentas familianoj de tiu ideala familio, kiun Esperanto kreis tra la tuta mondo.

ORIGINALO INTERLINGVA PARALELO TRADUKO

Malgraŭ tio, la negroj montris sian kontentecon per ĝojaj ekkrioj, ĉar la sovaĝeco kaj grandiozezo de la nova lando ion memorigis ilin pri la forlasita hejmo. La grandaj palmarboj, kiuj preĝe etendadis al la ĉielo la larĝon de siaj manplatoj, egalis al tiuj de la marbordoj afrikaj; kaj la malproksima verdaĵo de la arbaroj ekzakte respondis al la virgeco kaj danĝero de la afrikaj; la spuroj de la malmultaj homoj perdiĝis en la vasteco de la grundo...

Fragmento de la libro «La Nigra Spartako»
de la brazila poeto Geraldo Mattos.

A pesar de todo, los negros mostraron su contento con gozosas exclamaciones, porque la silvestre y grandioso del nuevo país les recordaba algo del abandonado hogar. Las grandes palmeras, que extendían al cielo como en oración la anchura de sus palmas, eran iguales a las de las orillas africanas; y la lejana verdura de los bosques correspondía exactamente a la virginidad y peligro de los africanos; las huellas de los pocos hombres se perdían en la inmensidad del terreno...

Fragmento del libro «El Espartaco negro» del
poeta brasileño Geraldo Mattos.



La Valencia Banko kaj la Ĉefa Teatro sin reflektas sur la akvon, kiu ĉi tie atingis, en sia kulmino, altecon de preskaŭ du metroj

DOLORO KUN FUNEBRO

Meze kaj nordokcidente de la Valencia provinco, je 80 kilometroj proksimume de la ĉefurbo, troviĝas alta montoĉeno, kiu formas naturan deklivon por la rivero Turia kaj ceteraj defluejoj, kiuj, antaŭ ol atingi la maron, havas ŝancon por mildigi la premon de sia defalo, kviete glitante tra vasta zorge kulturita ebenaĵo. En la nokto de dimanĉo 13-an de Oktobro, densaj nigraj nubegoj haltigis sian marŝon pro kunpuŝiĝo ĉe la dirita montoĉeno. La sekvo estis apoteoza pluvego, vera rekordo en Eŭropo — 852 litroj por ĉiu metro kvadrata — kies tuta kvanto falis sur ĉi tiun orientan deklivon, subite transformante en detruan lavangon la fluon de la rivero kaj de ĉiuj aliaj defluejoj en najbaraj intermontoj.

Renversante ĉion survoje: dronintajn brutojn, trunkojn, kamparanajn domojn kaj eĉ tutan grundon de modestaj kampoj, la terura alfluo trafis la urbon je la unua kaj duono, en la frua mateno de lundo 14-an de Oktobro, dato de la tragedio!

Valencio kuŝas kvazaŭ apogita, ĉe sia norda flanko, al la rivero, kiu tie parte ĝin trairas. Unue troviĝas dense loĝataj laboristaj kvartaloj, poste la rivero najbaras al luksaj stratoj, antaŭ ol eniri en vastan kamparon, ĝis la enfluejo, apud la havena distrikto kaj inter pluraj loĝlokoj kun multe da loĝantoj. Ĉi tie, la detruo estis komplete kaj la nombro da viktimoj

PER KANTO ANKAŬ ONI POVAS OMAĜI GAJAN URBON, KIAM ĜI PROFUNDE MALGAJAS... JEN DO I

Pro longjara korespondado kaj du efektivaj vizitoj, nia kara amiko Izak Schoon, el Haarlem (Nederlando), estas plaĉe konsiderata, kvazaŭ valenciano mem. Hodiaŭ ni aperigas, kun iuvito al kunkanto, la inspiritan tekston, kiun li verkis adaptita al la tutmonde konata kanzono VALENCIA

Valencia, kies tero sunkisita kuŝas ĉiam sub florar'
 Valencia, kies belaj la knabinoj plektas rozojn en harar'
 Valencia, kun aromo bonodora de l' oranĝoj, kvazaŭ or'...
 Valencia, kies palmoj susuradas pri la am' en nokta hor'.

La blankaj barokoj,
 La floroj de l' oranĝoj,
 La ĉielo turkiza...
 Helblua bel' de l' mar',
 Amata de la loĝantoj,
 Laŭdata per amkantoj,
 En tuta mond, la amantoj
 Vin ŝatas sen kompar'!

Valencia, paradizo en la mondo, kun benita la klimat',
 Valencia, la edeno de la muzoj, de l' fekundo la legat'...
 Valencia, citadelo de l' scienco, de la arto kaj muzik',
 Valencia, trezorejo de folkloro, de la am' kaj romantik'.

Ĉe noktsen
 Al dolĉa l'
 Ridadas la
 Ĉe bru' de
 Tremsonas
 Ĉe danco p
 Allogas tu
 Vivu Vale

Valencia, kun Esperantista rond
 Valencia, hele brilas Verda Ste
 Valencia, citadelo de la gloro, d
 Valencia, Esperanta Trezorejo e

Al vi enamiĝas ĉiu
 Vian gloron kantas

En sfero ei
 En sfero si
 En sfero ar

VIVU VA

Personaj travivaĵoj de samideano dum la inundo

tre granda, ĉar de la urbo ĝis la maro (6 kilometroj) la akvo kovris ĉion senlime. En la urbo mem, la impeto kaj premo de la akvo, kun nivelo proksima al la du metroj, tra la mallargaj stratoj de laboristaj kvartaloj, ne nur kaŭzis egajn damaĝojn en la modestaj hejmaj havaĵoj, sed --eĉ pli grave!-- ke la malfortaj fundamentoj de tre malnovaj konstruaĵoj ekskuigis. Pli ol tricent domoj ne plu estas loĝeblaj; kaj, devige malkonstruante ilin, oni konstatastas nun, ke multaj aliaj, pro manko de apogo, ankaŭ prezentas signojn de renversigo.

Cetere, la inundo ne konis nek respektis barojn; tiel same furioze, ĝi konkeris la avenuojn kaj parkojn, en la riĉulajn kvartalojn, aŭ en la centro de la urbo. Luksaj magazenoj, publikaj oficejoj (Poŝto kaj Telegrafoj) teatroj kaj bankoj suferis nekalkuleblajn perdojn, precipe pro tio, ke, kun la akvo, amasego da koto invadis la kelojn kaj subterajn etaĝojn, kie butikoj gardis siajn plej valorajn varojn kaj la bankoj siajn plej karajn dokumentojn.

Posttagmeze, kun skorto de fulmoj kaj tondroj, venis la dua diluvo, kiu altigis la nivelon de la unua inundo ankoraŭ duonmetron. La vespero kaj nokto de tiu lundo estis io, tiel terura, kiel neniam antaŭe okazis al nia urbo. Tamen, tuja helpo de la tuta lando ebligis la normalecon, kiu nun, post la fatala inkubo, ekmontriĝas

hele, plej esperige.
L. H.

Mi loĝas en Valencio, en teretaĝo de domo, kiu kuŝas trans la rivero kaj fronte al ĝi. Suspektante nenium danĝeron, mi dormadis tute trankvile, kiam fortaj batoj subite frapitaj ĉe la pordo alarme min vekis. Tiam estis ĝuste la unua kaj duono, en la frua mateno de lundo, la 14^{an} de Oktobro. Duone vestita, mi malfermis la enirejon kaj vidis najbaron, kiu, kvazaŭ frêneza frapis kaj frapadis sur pordojn kaj fenestrojn, kriegante: «La rivero, la rivero elbordigas!» Efektive, per rapida ekrigardo mi vidis, ke la rivero kovris la tutan straton. Tuj-tuje, mi portis la alarmon al la ceteraj familianoj; kun ili kaj kun la eta fileto, mi plaŭde kuregis tra la akvomaso, ĝis proksima ŝtuparo de najbara korto. Mi revenis al la hejmo, kien la akvo jam eniris impete. Tamen, ankoraŭ mi sukcesis preni kelkajn vestaĵojn, sed la pordon mi ne povis fermi, pro la forto de la akvo, kiu jam atingis miajn koksojn. Ree kun la familio, savinte tiajn vestaĵojn, mi intencis ripeti la *ekskurson*; sed, tute neeble! Kuraga samcela najbaro devis senespere reveni, kun akvo jam ĉe la brusto.

Oni bonvole akceptis nin en la plej supra etaĝo; tie mi povis surmeti sekajn vestojn. De la teraso estis videbla la impona spektaklo de kvieta rivero transformita en furioza maro. La nokto estis hela; kaj la publikaj lumigiloj ankoraŭ ne estingiĝis. Ni vidis la dompordojn krevi kaj forsalti; ni vidis dispeciĝi kaj malaperi unu el la pontoj, dum en alia pli proksima, pluraj personoj, kaptitaj, en paroksismo de teruro, angore baraktis por eskapi...

La fluego forkunportis plej lavange, en sia ondato, dronintajn bestojn: ĉevalojn, bovinojn, porkojn, k. t. p. krom meblojn, trabojn, arbojn --ankoraŭ kun branĉoj kaj radikoj-- plus mil kaj mil pliajn objektojn, kiuj haose katapultis la ŝtonajn muregojn de la pontoj aŭ obstrukciis iliajn arkojn, por devoĵigi en la urbon la kirlantan fluegon. Kiam la suno ekaperis, la akvo-nivelo ekster la rivero atingis altecon de du metroj. Tio estis dum la unua alfluo.

Je la tria posttagmeze, en akompano de diluvo kaj timeginda fulmotondrado, venis la dua lavango, ankoraŭ pli detrua, kies nivelo estis sepdek centimetrojn pli alta ol la unua. Kiam vespere, la akvo kvietigis kaj elfundiĝis, ĉio ĉirkaŭe estis nur marĉo da koto...
JUAN DEVIS

FAMA KANZONO VALENCIA!

hadoj
matin'
uno
tamburin'...
astanjetoj
sia
etoj...
ia!!
, tutunika en la mond',
, kvazaŭ sun' ĉe l' horizont'...
la paco kaj kultur'
ravega belnatur'...
er tuta kor'!
uta mond' en hor'!
otika,
apatika,
mistika...
NCIA !!!



NOVA DANĜERO POR LA KAMPARANOJ

De longe, la bienuloj konstatas, ke kamparanoj laborintaj en siloj ĵus pleningitaj per maizo, melikago, trifolio kaj, eble, per aliaj grenoj aŭ furagoj, suferas malsanojn ĉe la spiraparato, kiuj ĝis pli malpli gravaj kaj eĉ mortigaj en pluraj kazoj. Tio instigis la kuracistojn el ŝtato Minnesota (Usono) serĉi la kialon de tiaj afekcioj, ĉar lastatempe mortis tri kamparanoj, unu el ili 36 horojn post laborado en silo, plena de seka trifolio; la du aliaj mortis 27 aŭ 28 tagojn poste. La ceteraj laboristoj deklaris, ke ili flaris en la silo tipe karakterizan gasodoron.

Ne estis facile tasko por la spertuloj de la Instituto de Agrikulturo en la Universitato trovi la mortigan kaŭzon. Tamen, ege utilis al ili antaŭaj esploroj faritaj en la Universitato de Wisconsin, kies sciencistoj deklaris antaŭ nelonge, ke gaso de silo eble mortigas la bestojn, kiuj eniras en tiajn ejojn. Post paciencaj kaj persistaj esploroj, oni konkludis, ke sendube la «gaso de silo», t. e. bioksido de nitrogeno, okazigas tiajn mortojn kaj malsanojn, ĉar tuj kiam oni ensiligas la cititajn terproduktaĵojn, ĉi tiuj eligas toksan gason. Kiu estigas edemon de la pulmo (1) kaj, sekve, sufokon pro malfacila spirado, kio rapide mortigas la pacienton.

En malpli gravaj kazoj, sed ankaŭ mortigaj, la nekropsio montris, ke pro pulma edemo estiĝas novaj teksaĵoj, kiuj obstrukcas la bronketojn (2) kaŭzante sufokon kaj morton pro malbona spirado kaj malbona funkciado de la koro. Feliĉe, tia danĝera periodo ĉe la siloj ne daŭras longe, ĉar dek tagojn post la ensiligado ĉesas la gasgenerado kaj, sen ia risko, ĉiu viva estaĵo povas eniri en la silojn. Por eviti tiel gravan danĝeron, certe efikas senĉesa aerumado de la siloj, sed ne estas facile forigi la gason, ĉar ĝi estas pli peza ol la aero. Tiurilate, jen kion konsilas la koncerna komisiono:

1.° Nepre oni devas malpermesi al ĉiuj eniri en silojn, ekde la depono de terproduktaĵoj, ĝis dek tagoj post la fino de tia laboro.

2.° Kiel eble plej proksime de la planko oni devas instalii ventolilon (kvaŭzaŭ blovsorbilon) por forigi la gason.

3.° Oni devas starigi barilojn, ĉirkaŭ la ĵuspleningitaj siloj, por malhelpi la eniron al infanoj kaj bestoj.

D-ro E. TUDELA

(1) Eniĝo de sanga sero en la pulmajn teksaĵojn.

(2) Pulmaj tubetoj tra kiuj fluas la aero, nepre necesa por la spirado.

19 Congreso Español de Esperanto

CASTELLÓN ● 24 - 27 JULIO 1958

Previo el oportuno estudio y varias gestiones ha sido elegida la Región Valenciana, representada esta vez por la muy hermosa y laboriosa ciudad de Castellón de la Plana, como lugar de reunión para nuestro próximo Congreso. Se está constituyendo el correspondiente Comité Organizador, que espera contar con el valioso apoyo de las autoridades locales. La situación geográfica de la ciudad — importantísimo centro naranjero — tan cercana a Cataluña y Aragón, así como su amable y jovial ambiente, en un clima ideal junto al luminoso Mediterráneo, hace suponer una gran afluencia de asistentes al magno certamen del esperantismo español.

Como un primer avance de optimismo, por lo que a despidios se refiere, hemos de decir que se confía en poder disponer de un confortable alojamiento, con 50 ó más camas, como servicio completamente gratuito...

Así pues, sin dudas ni vacilaciones: ¡A Castellón, el verano que viene! Pídale información y detalles complementarios al

COMITE ORGANIZADOR del

19 Congreso Español de Esperanto

Calle Allica, 189 - Castellón de la Plana

ESPERANTO EN LA RADIO

Gracias a la incansable labor de Don Alfredo Santacana, entusiasta samiceano, seminarista hasta hace poco en Vich, y actualmente en el Seminario Pontificio de Tarragona, los Cursos de Esperanto por Correspondencia de nuestra Federación presentan un curso del Idioma Internacional, difundido por la emisora «Radio Vich».

Este curso, según guión del Sr. Santacana, consta de veinte lecciones presentadas en forma ágil y atrayente. Fueron grabadas en cinta magnetofónica, con todo esmero, en el local de «Esperanto-Grupo Moyá», por varios componentes del mismo.

Las lecciones van complementadas con el librito «El Esperanto al alcance de todos» del Dr. Bremón, y como signo del éxito de la emisión, podemos señalar que en la mencionada ciudad de Vich, al anuncio del Curso, en pocos días se vendieron: cerca de cien ejemplares de la expresada gramática.

Las emisiones tienen lugar todos los viernes a las 10:45 de la noche a través de «Radio Vich» (1.550 kilociclos, 193'54 metros).

Rogando a nuestros lectores saluden a esta emisora, nos place comunicar, principalmente a los Grupos, que después de ser radiado, este curso quedará disponible para ser transmitido por otras emisoras.

Sed... neniel forgesu la tre interesajn elsendojn de «Radio Roma»:

Marde, merkrede kaj vendrede.

Horo: 18,55 ĝis 19,10 (hispana tempo).

Metroj 30,90 - 41,24 - 50,34

Skribu al «Radio Roma» Esperanto-Fako
Casella Postale, 320 - Roma (Italia)

EKSTRAKTO EL BONA HUMORO

Gardisto al vagantaj ciganoj:

—Ĉi tie vi ne rajtas kampadi.

—Sed, ni havas parolan permeson de la urbestro.

Nu, bone, montru ĝin...

Patro kaj filo promenas surstrate.

La filo demandas:

—Kiel oni scias, ke viro estas ebria?

—Tre facile. La ebriuloj ĉiam vidas la objektojn duoblaj. Atentu praktikan ekzemplon: Ĉu vi vidas tiujn kvar sinjorojn, kiuj venas renkonte al ni? Jen, anstataŭ kvar, ebriulo vidus ok.

—Sed, paĉjo, ili estas nur du...

—Ankoraŭ mi ne povis kompreni, kial la leĝo malpermesas havi pli da unu edzino!

—Kiam vi edziĝos, tre klare vi komprenos, ke tiu leĝo ekzistas por protekti tiujn, kiuj mem ne kapablas sin protekti.

Estro al sia oficisto:

—Via edzino venis por diri, ke se vi ne gajnas pli altan salajron, ŝi forlasos vin. Tamen, pro tio ke mi deziras vin favori, de post la proksima monato, vi perlaboros tricent pesetojn malpli ol nun...

Li.—Mi ne komprenas, ke estas ĉapelo tiu fuŝaĵo, kiun vi portas sur la kapo.

Ŝi.—Ankaŭ mi ne komprenas, ke vi nomas kapo tiun fuŝaĵon, kiun vi portas sub la ĉapelo.

—Se vi havas du fratojn, kial do via patrino diras, ke ŝi havas tri filojn?

KREDEBLE, VI NE SCIAS, KE...

En Eŭropo, la terpomo estis akceptata dekomence kun granda singardemo, ĉar oni disfamigis, ke ĝi kunportas la lepron. Nur kiam reĝoj kaj gravaj personoj ekmanĝis tiun nutran tuberon, la popolo akceptis ĝin kaj taksis ĝian valoron.

En diversaj okcidentaj landoj, ĝis la 15^a jarcento, la kuracistoj ne rajtis edziĝi. Se iu el ili malobeis tiun leĝon, oni tuj lin forpelis de la koncerna fakultato.

*Por la bono oni bezonas pruvojn,
sed ne por la belo.*

VICTOR HUGO

..... Kanto pri la Amo

Nerimarkite kaj subite,
kiel dumnokta florapero,
ni staras en palpebla vero,
al dolĉ' turmenta kondamnite;
kaj dronas, dronas sur la tero.

Impete kiel uragano,
reganto plej potenca venas,
kaj en delica ĝu' ni svenas
sub venka sturmo de la Amo,
kiu nin pelas kaj katenas.

Ĝi scias dolĉajn fruktojn doni...
Ĉu krimu hom' aŭ noble agu,
per gemoj de artkreo: pagu!
scias la am' al li ordoni.
Eĉ, ke tra viv' li sola vagu!

Kaj kiam ĝi la sian prenis,
eskape fuĝas ĝi el koroj
kaj restas nur la rememoroj.
En bela lud' vi arlekenis,
vi, vanludintaj amaktoroj.

Tam el ruboj de l' pasio
kaj el postbrula amocindro,
masonos kontraŭ vivo-vintro,
kvarecan kastelon gracia Dio;
ĝin ring' simbolas sur la fingro.

JIRI KOŘINEK

Brno (Ĉeĥoslovakio)

SFINKSA ANGULETO KRESKANTAJ VORTOJ

Se al speciala cifero oni antaŭmetas literojn, ĝi transformiĝos en diversaj vortoj, laŭ sinsekva antaŭmeto de plia litero, tiel:

1 litero = cifero	4 literoj = planedo
2 literoj = nomo de litero	5 literoj = malpeza substanco
3 literoj = elemento	6 literoj = korespondajo

Ĝusta solvo gajnos unu poenton ĝis 8. Januaro.

SOLVO PRI LA MUŜO VOJAĜEMA EN LA PASINTA NUMERO

La muŝo bezonas forton nur por flugi sian metron po sekundo, ĉar, interne de la vagono kaj portata de la trajno, ĝi iras tute senpene la dek-ses metrojn po sekundo.

La modo ĉiam pravas!

CHRISTIAN DIOR

NOVAJ LIBROJ SUB LA EFIKO DE Kritiko

LA FLOROJ DE L' MALBONO de Charles Baudelaire. Kompleta eldono esperantigita de Roger Bernard, Magda Carlssoon, Hilda Dresen, Kálman Kalocsay, Lajos Tárkony, Henri Vatré kaj Gaston Waringhien, kaj redaktita de K. Kalocsay rilate al la formo kaj G. Waringhien rilate al la senca fideleco.—Ilustrita kun du portretoj de la aŭtoro. Kovrilo de John Hartley.—STAFETO, Bel-literatura Eldon-serio, n-roj 8-9.—J. Régulo, Eldonisto.—La Laguna (Tenerife), Kanariaj Insuloj, 1957. 400 paĝoj. 16 x 22,5 cm. Prezo: 100 pesetoj, 2,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro.

Tiu verko ja meritas longan recenzon; sed, ĉar kelkaj malpaciencaj legantoj deziros sintezon, mi volas, antaŭ ol detale analizi la fundon kaj la formon, proponi du asertojn, nome:

I.—Tiu verko estas la plej grava kaj impona el la multaj tradukaj aperintaj en Esperanto.

II.—Ĝi restos kiel baza verko por ĉiuj, kiuj volos studi la modernan poezion ne nur Francan, sed universalan.

Certe, la traduko de *Infero* estis granda ŝtupo en la historio de Esperanto; sed *Infero* estas nur parto de *La Dia Komedio*, kaj *La Dia Komedio* nur parto de la Dantea verkaro; kontraŭe, la recenzata libro estas kompleta poeziaro de Baudelaire. La kompilintoj, sin apogante en la du kompletaj francaj eldonoj kaj en la preparaj laboroj por la tria, aperonta je la morto de la aŭtoro, ordigis la pecojn tiel trafe, laŭ la temoj kaj laŭ la inspiroj, ke oni povas studi la vivon, la dolorojn, la ribelojn de la malfeliĉa viro, same klare legante la valoran dudekpaĝan eseon de la enkonduko ol tra legante la senmortajn versojn, tra kiuj aperas la homo, tia kia estis B. kiam li amis kaj kiam li malamis kiam li ploris kaj kiam li ribelis; kiam li diboĉis kaj kiam li filozofis. Mi ne surpriziĝos, se eĉ la Francaj beletristoj venus ĉerpi notojn al la E.-traduko: tiel kompletan verkon ili ne havas franclingve.

La taŭgeco de E. por la tradukarto plene pravas, ĉar estas neeble dum legado diveni, kiu estas la tradukanto: mi devis konstante iri al la tabelo serĉi la koncernan nomon, tiel unuecaj estas la lingvo kaj la konstruo, kaj tiel fidele ĝi respeguligas la aŭtoron. El tio ĉi sendube devenas la unueco, pli ol fare de la kompiligala laboro.

C. Baudelaire vivis de 1821. ĝis 1867. Li atingas do la finon de Romantiko kaj la komencon de Moderna Poezio; por pli bone diri, li estas la komenco de la moderna poezio. Li estas okaze mistiko-asketulo. Li sopiras al la belo, kie ajn ĝi esu; mi ne tute konsentas kun la kompilintoj pri tio ke B. ne amis la naturon: se en *La hararo*, *La dancanta serpento*, *La balkono* k. c. ne estus abundaj aludoj al naturo, sufiĉus la versoj:

...nek fajrujo, buduar' nek via amo
valoras al mi sunon radian sur la maro. (147).

Tial, li kantas la belecon de la Urbo (Parizo), la krepuskojn, la mizerulojn (*Ruĝhara Almozulino*), la diboĉulojn. Lia poezio estas, kompreneble, influata de lia vivo, malfeliĉa spirite: orfo je patro, li devas suferi duonpatron ne komprenantan lin; kaj korpe; infektita de terura malsano, liberigita al alkoholo kaj al drogoj:

*Mia juneco estis tenebra ŝtormo nura
malofte tralumita de sunradioj fuĝaj* (p. 72)

Tial:

Doloras vivi: estas sekreto tre konata (119)

Li estas tiel malfeliĉa ke:

Enviaj mi la sorton de la plej aĉaj brutoj (103)

Tiaj ĉagrenoj estas kaŭzo de la genio:

«*Naturo... Vin, ho malpura besto,*

*Uzas por la elforĝo de geniul' sublima,
Ho malnoblec' majesta! Ho grandiozo ŝlimal!*

Same, kiel ĉiu alkoholigito, li havas obsedon de la vermoj kaj de la morto.

Li diboĉas kaj drinkas, ĉar:

En la ebria bruto vekiga la anĝelo (130).

Kaj el la abisma malbeleco, li scias skulpti terure belajn versojn, kiuj atingas la zeniton en «*Putraĵo*», kiun mi neniam povis legi sen frostotremo ĝis ostoj; kaj mi eklegis ĝin en mia studentina tempo.

Estus neeble pritrakti la multajn belajn pecojn entenatajn en la verko: Unuj sentos timon, aliaj naŭzojn, aliaj nekompreneblan altiron, ĉar

Nur fortajn ebrigas la ĉarmo de l' hororo

Sed ĉiuj konstatos, ke ĝi estas —mi devone asertu— fundamenta monda literatura verko kaj fundamenta Esperanta tradukaĵo.

La lertaj tradukistoj plene adaptis la koncernajn metrojn al la E. metrikaj leĝoj, kaj la muzikeco de la verko multe gajnis pro tio. La iom unuton silaban ritmon anstataŭis la plensona pieda ritmo. La plej ofta estas la aleksandra verso, redonita Esperanten per 3 jamboj kaj unu krom-

silabo en ĉiu duonverso, kaj la naŭsilaba verso, ankaŭ tradukita per jamboj aŭ per unu anapesto kaj tri trokeoj. Sed estas ankaŭ multaj dekunu-silabaj, kun Itala ritmo kaj, ankaŭ kun la ritmo, unu jambo kaj tri amfibrakoj. Nur unu poemeto estas oksilaba (*Posttagmeza Kanto*).

Baudelaire jonglis kun metrokombinoj, fidele tradukitaj; tial mi trovas strofojn kun 8- kaj 6-silabaj versoj (*Invito por Vojaĝo*), 9-6. (*La dancanta serpento*) - (*Amoro kaj Kranio*), 14-6 (*La muziko*), 14-8 (*La veneno*), 14-9 (pluraj, inter aliaj *Putraĝo, Konfeso...*) 11-9 (*La Kato*). Oni ne hezitis, en tiu verko uzi la sinalefon kaj pli ofte la kunfandiĝon de du vokaloj en diptongon, ne nur en vortoj: *Don Juan, Don Luis*, kiuj ja estas originale unusilabaj; sed en *ĉiela* (dusilaba, paĝo 135, kvara verso) *Januaro*, trisilaba, (paĝ. 70) *piedoj* (dusilaba, same (170) *ĉielo* (100) *tualetto* (124) k. t. p. Tiujn du licencojn, mi nur povas laŭdi; ili pli oftigas la oportunojn al versfaranto, sen malfacilo, nek por legi nek por kompreni.

Unu regulo de la Franca versfarado: la mikso de viraj kaj inaj rimoj, estas ordinare neglektata; sed kiam oni ĝin uzas, ekzemple en *La Horloĝo* —unu el la plej fidele, preskaŭ laŭvorte tradukita— ĝi ankoraŭ plibeligas la muzikan ĉarmon de la senmorta peco. La rimo estas perfekta, preskaŭ ĉiam. Abundas la asonancoj bonaj: (*Estas-estras, Sorga-dolĉa, Stupoj-nuboj*); aliaj ne tiel multe bonaj: (*Flanko-elfanto*), kaj, bedaŭrinde, mi trovas kelkajn rimajn agordojn: (*Farboj-cerboj; Antro-ventro*) al kiuj, mi konfesas, miaj latinidaj oreloj estas persone kaj prosone furiozaj malamikoj.

Sed, ĉefe estas mirinda la granda vario de sonetoj, se oni konsideras tia ĉiun dekkvar-versan strofon. Neniu verkisto ja trovis tiom da belaj kombinoj kaj neniu tradukito tiel bonajn tradukantojn...

Mi citu kelkajn:

Kvaruloj paralele rimataj, 14-silabaj (*Nebuloj kaj pluvoj*) aŭ 9-silabaj (*La vino de l' geamantoj*). Tamen, recenzo ne estus kompleta se iomete oni ne mallaŭdus. Mi, per kuracista esploro serĉos kelkajn makuletojn; tio pruvos, ke, kiam mi laŭdas, mi konsciencas laŭdas... Unu estas la traduko de du versoj de *La homo kaj la maro*. La aŭtoro parolas en nea formo: *Homo, neniu sondis la fundon de viaj abismoj Ho maro, neniu konas viun riĉojn intimajn* (*)

Sed, la tradukintoj konsideris bone adopti la demandan formon:

«Homo, Vin kiu sondis ĝis la abisma fundo? Mar'kiu konas riĉojn intimajn de l' profundo?»

Mi ne povas kredi, ke tiel lertaj aŭtoroj trovis malfacile doni la originalan formon, tiel multe pri forta, pli trafa kaj pli impresanta. Alia estas la mikso de du perfektaj rimoj kun aliaj du perfektaj; sed la kvar inter ili asonancoj. Ekzemple, en *La cigno* (p. 199). La rimoj de la dua kvaropo estas: *Dormo-urbformo kaj Rajdodomo-homo*. Ni atentu ke la 4 havas la vokalojn o-o. Same okazas en la tria kvaropo: *Barakto-flakoj, Akanto-brokanto*. La leganto provu anstataŭi du el ili per alia vokalo, kvankam la vortoj nenion signifas, nur por konstati kiel multe pli muzike sonoras. Mi ja scias, ke tio ne estas «krimo» en la E. versfarado, sed okazigas pardon de muzikeco kaj estas domaĝe, ke tio ripetigas en aliaj versoj de la libro. La provizvorto de tiel multe ampleksa libro estas kompreneble ankaŭ ampleksa; sed mi plezure konstatas, ke nur 14 tute novaj vortoj aperas en la koncerna kaj tre detala tabelo. El ili *Alkemisto, Ĥemisto* estas vario de aliaj E. vortoj. *Miso* estas substantivigo de prefikso, tute Zamenhofs, *Dominacio, Eksvoto, Lamio, Nepento, Paranimfo*, religiaj aŭ historiaj vortoj; nur restas *Vori, Virulenta, Loza, Rojo, Ronĝi, Sombra*, kies neceso estas diskutebla, diskutinda kaj diskutenda; sed certe ne de mi diskutota.

Tre trafaj vortoj, kiujn mi ŝatas, estas: *pavas* (p. 86) *traas* (uzata de du tradukistoj) (p. 161, 138) *vojpluis* (202), *tra-tempestas, kaptelbas...* Kontraŭe al mi ne plaĉas: *memoriva* (132), *pentivo* (134), *kiom* (sen *tiom*) (152), *el* (anstataŭ *kiel*, tute ne necesa, ĉar oni uzas *kiel* plurfoje, kvazaŭ unusilaba) *se* (sen kondiĉa tempo (102) kaj *Per vi mi ŝanĝas oron fero* kaj paralele:

kaj paradizon je infero.

Ambaŭ bonaj formoj; sed ili ambaŭ devus esti egale konstruitaj.

Mi daŭrus kaj ne elĉerpus la grandajn fundajn belajojn kaj formojn. La leganto aĉetu la libron, bele eldonita de STAFETO, kaj rajtigos la asertojn, faritajn komence de ĉi tiu recenzo.

A. NUÑEZ DUBUS

(*) Mi ne pretendas, ke tio estas versa traduko; mi nur laŭvorte esperantigas la B. - versojn:

Homme, nul n'a sondé le fond de tes abîmes,
O mer, nul ne connaît tes intimes richesses.

EN VISPERAS DE AÑO NUEVO, hay que prepararse a cumplir con
 tres federativos y pagar la correspondiente cuota de 1958, según las vigentes tarifas:

Socio de número 15 pesetas — Socio abonado: 50 pesetas — Socio protector: 80 pesetas

Los socios de número no reciben el BOLETIN; los socios abonados reciben un ejemplar y los protectores dos ejemplares

ANONCETOJ

Estoy muy interesado en recibir el n.º 43 del BOLETIN (julio 1952) por faltarme en mi colección; a quien me lo proporcione daré su importe en efectivo, sellos de correo, vitolas o lo que me solicitara.

Escribid a José López Sáez

Calle Enriqueta Lozano, 7 ☉ Granada

Mi deziras ricevi detektiv-noveletojn, popolajn rakontojn aŭ fabelojn, folklorajn rakontojn, porinfanajn historietojn kaj humorajojn, por ebla publikigo en la ĉiutaga pola gazetaro, S-ro Walerian Wodarezyk, str. Swietostawska, 57-7.

Warszawa 26 ☉ (Pollando)

Estas dezirinde interŝanĝi rakontaĵojn pri jenaj temoj: junulaj, infanaj, aventuraĵ kaj ĉio alia taŭga por la popola interkompreniĝo. Skribu al:

S-ro Edwin Wugk — Wilmsdorfer str. 20
 Dresden - A 20 (Germanio)

15-jara junulo, pri sporto kaj filmoj.
 Skribu al: Vladimir Fiala, Répov, 117
 Milada. Boleslav (Ĉeĥoslovakio)

24-jara fraŭlino, oficeistino en metalfabriko,
 pri folkloro kaj kutimoj. Skribu al:
 Maria Siwinska

Mirkow, 33 ☉ Wroclaw (Pollando)

:: Kanada instruisto dez. korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn kun tutmondaj geesperantistoj. Skribu al S-ro Bruno Samson, R. R. n.º 1, St. Barnabé - Nord (P. Q.) (Kanado)

Al UEA-anoj en Hispanujo

Kiel certe vi jam scias, mi ĵus anstataŭis S-ron Delfi Dalmau, kiel Ĉefdelegito de U. E. A. Malfacila afero estas anstataŭi lin en posteno, kiun tiel kompetente li gvidis dum multaj jaroj. Je via nomo, mi rekonas kaj dankas lian laboron kaj, kun via helpo, mi povos imiti lin.

Senkondiĉe je via dispono

Ramón Molera — Ĉefdelegito de U. E. A.
 Str. Hospital, 13 — MOYÀ (Barcelona)

OKAZE DE KRISTNASKO AŬ NOVA JARO JEN OPORTUNA DONAĈO! **LA MALPRUDENTA SCIVOLULO**

Interesa novelo de Cervantes
 en klara, bela kaj fidela traduko de
LUIS HERNANDEZ

68 paĝoj 20 x 14 cm. Belaj ilustraĵoj kaj vinjetaĵ.

Arta kvinkolora surkovrilo. 20 pesetoj.

Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio

NEKROLOGO

Ni informas kordolore la hispanan esperantistaron pri forpaso de unu el la plej entuziasmaj aktivuloj de la Grupo «La Verda Kolombejo», de Ciaño-Santa Ana. La 11-an de pasinta Julio mortis, je aĝo de 39 jaroj, S-ano Gabino Camporro Fernández, el Ladredo — La Felguera; li forlasis edzinon kaj filon 10-jaran al kiuj ni esprimas nian sinceran kondolencan.

TESORERIA

Relación de los números agraciados:

25 de Octubre. Núm. 13.852 a D. Juan Bosch, de Valencia, por su núm. 52.
 25 de Noviembre. N.º 19.824 a Hispana Esp. Fervojista Asocio, de Zaragoza, por su número 24.

PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Octubre-Novbre. 1957)

Suma anterior.....	4.553	Pras.
F. Abella - Barcelona	25	»
E. Wolff - Sta. Cruz de Tenerife	25	»
T. Elizondo - Trucios	25	»
J. Montfort - Barcelona	5	»
M. Salam - Valencia	50	»
J. Figueras - Barcelona	10	»
R. Mareury - Málaga	40	»
A. Escamilla - Pegalajar	25	»
J. Soler - Alicante	50	»
S. Arizmendi - Eibar	15	»
F. Cervera - Paiporta	2	»
J. Saladrigos - Badalona	10	»
J. Montfort - Barcelona	5	»
R. Granados - La Línea	10	»
Coop. La Andresense - Barcelona..	25	»
Total	4.875	»

Ahora... ¡Felices Pascuas! y hasta la rúbrica final del próximo número.